

Laŭokaza Novaĵletero

organo de la

**Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo.**

76
1.2.1989

Redakcia adreso :
19 Cranbury Road,
Eastleigh, Hants.,
SO5 5HB,
Britio.

IKEF

★

Numero 25; 1984 februaro, 1989.

Laŭokaza Novaĵletero,

februaro, 1989a.

E n h a v o .

<u>paĝo</u>	<u>titolo(j)</u>
2	Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo!
3	Administrado; La Biblioteko de IKEF.
4	Leteroj al la Redaktoro.
5	Enigmo, ĉe la rando de inflacio; Lorens' Mi.
6)	Financa Raporto por 1988; Roland Rotsaert.
7)	
8	Por rajti redakti, oni devas esti kompetenta! Ak-ano Bernard Golden.
9	la sama - kompletigo
10	La oficejo: pasiva kosto aŭ aktiva investaĵo; Ken Davies.
11	la sama - kompletigo
12	La Biblioteko de IKEF - kompletigo Teknike pri la LN-o.

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.
Kunlaboranta faka asocio de Universala Esperanto-Asocio.

La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario
S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto
D-ro István Gether
S-ro François-Xavier Gilbert
S-ro Lawrence Mee
D-ro Marco Picasso
S-ro Seikó Yamasaki

Revizoro por la financa raporto:
D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bŭhl 16, Okc. Germanio.

Redaktoro, Laŭokaza Novaĵletero:
S-ro Lawrence Mee,
19 Cranbury Road,
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,
Britio.

Financa sidejo:
Visspaanstraat 97,
8000 Brugge, Belgio.

Prizorganto, presado-ekspedado:
S-ro F.-X. Gilbert,
Vert Coteau,
Longeville-en-Barrois,
55000 Bar-le-Duc, Francio.

-oOo-

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

Pagoj — Perantoj — Kotizoj

Ciuj landoj: Baza kotizo: 400 belgaj frankoj aŭ 20 nederlandaj guldenoj.
Dumviva membreco: unu-foja pago egala al 20-obla baza kotizo.

Poŝtĉekkonto belga, (Bruselo):
n-ro 000-1592629-83
je la nomo de IKEF, p.a. R. Rotsaert,
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio.

Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio,
Rotterdam, Nederlando,
je la nomo de Internacia Komerca kaj
Ekonomia Fakgrupo, Belgio.

Perantoj:

Britio
- provizore vakas -

Italio
D-ro M. Picasso,
via De Gasperi 7,
20057 Veduggio al Lambro.

Francio
S-ro F.-X. Gilbert,
Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,
55000 Bar-le-Duc. (CCP1275-89 L Nancy)

Jugoslavio
S-ro S. Taleski,
ul. 'Oslo' br. 12,
91000 Skopje.

Okc. Germanio Kotizo: 20 markoj.
S-ro F.J. Braun,
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bŭhl 16.
(Volksbank Bŭhl 713120 - BLZ 66291400)

Novzelando Kotizo: 20 dolaroj.
S-ro J.C. Rapley,
P.O. Box 70-038,
Ranui, Auckland B.

Hungario
S-ro J. Horvath,
Varsányi Irén u. 8,
1027 Budapest.

Togolando
S-ro Koffi Bbeglo,
B.P. 13169,
Nyékonakpoé, Lomé.

ADMINISTRADO.

La Financa Konsilanto agnoskas kun danko donacojn al nia kaso, ĝis la fino de januaro.

S-ro L. Mee, (IKEF2) 689 belgaj frankoj, kaj
S-ro H. Deseure, (IKEF38) 100 belgaj frankoj.

Servo en letero.

En la revuo *Esperanto*, por januaro 1989, aperis anonceto pri servo por interŝanĝi diversajn etvarojn. Laŭ peto de nia redaktoro, la prizorganto, S-ro Pentti Törmälä, (Kirkkokatu 9, 06100 Porvoo, Finnlando), donis kelkajn klarigojn:

"... Mi klarigas mallonge: ĉi tia agado estus plibonigaĵo de la agado "Interhelpa Grupo" en la jaroj '82 - '84, kiun mi iniciatis. Ĝi funkciis ŝanĝante filatelaĵojn, teon, kafon, Esperantaĵojn, ktp, inter finnoj, poloj kaj ĉinoj, (sub 10 personoj en tuto). Neniu estis komercisto, sed ĉiu povis esti kaj aĉetanto kaj ŝanĝanto. Kiel alimaniere transigi komerce en Esperantujo al bezonantoj en preskaŭ ĉiuj landoj la varetojn? Nature, ĉi tio apenaŭ donas komercon utilan. ... "

Tia iniciato sendube meritas almenaŭ moralan subtenon, flanke de individuaj membroj de nia Fakgrupo.

-oOo-

La Biblioteko de IKEF.

La unua kajero en nova jaro estas bona okazo memorigi niajn membrojn pri nia Biblioteko. Donacitaj jam estas la sekvaj libroj.

Historio de la lingvo Esperanto; Edmond Privat; (du volumoj)
1a parto, 1887-1900, eldonita en Leipzig, 1923; 74 paĝoj,
2a parto, 1900-1927, eldonita en Leipzig, 1927; 199 paĝoj.

Manlibro pri komerco, (en du lingvoj: germana k rusa);
Adolf Lane; dua eldono, Berlin 1926, en tri partoj; 475 paĝoj.

Komercaj korespondado k teknikoj, (en du lingvoj: germana k angla);
Karl Blattner; 17a eldono, Berlin 1983; 472 paĝoj.

Komerca korespondado; J. Borel; 2a eld. Berlin, 1922; 46 paĝoj.

Komercaj leteroj; C.A. Pruisen; 1a eld. Rickmansworth 1949; 63 p.

Esperanto por komerco, (parte en la angla lingvo);
W.M. Page; 1a eldono, London, 1924; 79 paĝoj.

Ekologio k Ekonomio, (Prelegserio sub la redaktado de
István Gether; Budapest, 1982; 94 paĝoj.

Indekso de la Mozaj Produktaĵoj; Komerc- k Industri-Cambro de la
Departamento Meuse; Bar-le-Duc 1986; 92 paĝoj.

Komerca Vortaro en Esperanto, (fotorepreso), Kreuz k Mazzolini;
S. Vito, (Italio) 1927; 93 paĝoj.

(daŭrigo je paĝo 12)

Leteroj al la Redaktoro.

de: S-ro Johano Rapley, (IKEF6), Nov-Zelando.

Nia LAŬOKAZA NOVAĴLETERO bonege servis dum kvar jaroj kaj 24 numeroj; ĝi aperis multe pli regule ol kelkaj periodaĵoj, kies titoloj aŭ abonkondiĉoj implicas pli bonan ritmon. Ankaŭ ĝia titolo estis konvena dum ĝia prova periodo, sed laŭ mi ne plu taŭgas.

Mi proponas, ke la venonta kunveno de IKEF-anoj elektu novan, definitivan titolon por nia Bulteno. Eĉ la simpla "Komerca Bulteno" verŝajne, kvankam ankoraŭ modesta, sufiĉas. Ĉu vi invitos aliajn sugestojn?

La Redaktoro respondas: dum iom da tempo la Estraro diskutas la temon de nova titolo por nia komunikilo, sed ne ĝis nun atingis konkludon. Nenio malhelpas aliajn membrojn proponi novan titolon, sed nia propra opinio estas, ke por forŝovi titolon jam akirintan iom da renomo, postulas pli klaran kialon ol simple, ke la antaŭa "ne plu taŭgas".

de: S-ro Franz Schneider, (IKEF13), Okc. Germanio.

Mi intertempe ricevis la Laŭokazan Novaĵleteron en la reduktita grandeco de A5. Tiu malgranda literarformato ne estas taŭga por malforta vid- kaj leg-kapablo, (82 jaraĝa). Ĉar la originalaj tekstopaĝoj estas preparitaj sur folioj de la formato A4, mi tre afable petas sendi al mi la Laŭokazan Novaĵleteron en tiu granda formato. La kromelspezojn de afranko kaj tiel plu, mi volonte transpagos. ...

La Redaktoro respondas: volonte ni preparos apartan kajeron por vi, kaj ĝin ekspedos el Britio, sed la kosto ja estos iom alta. Pri tiu punkto vi atdos, verŝajne, de la Financa Konsilanto. Se iu alia membro volas partopreni en la sama servo, ni faros nian eblon. (Ĉu plaĉas al legantoj niaj provoj plibonigi la aspekton de la teksto lastatempe?)

de: S-ro Roland Rotsaert, la Financa Konsilanto, Belgio.

Mi ĝojas pro la entuziasmo de S-ro Gilbert pri lia AMSTRAD 9512. Se mi bone memoras, mi jam foje vidis anoncon pri tiu aparato en germana revuo. Ĝi estas plibonigita versio de la Joyce PCH 8256, kiun mi aĉetis antaŭ kelkaj jaroj. Joyce estas produkto de (brita) Amstrad, ankaŭ vendita de (germana) Schneider. Laŭdire ekestis kverelo inter la du firmaoj, kaj ĉiu el ili nun sekvas sian propran vojon. La nova 9512 verŝajne ne estas aĉetebla en Belgio.

Komence ankaŭ mi havis problemon por skribi Esperanton per Joyce, (kvankam la instruktilibro asertis, ke eblas!). Miaj, (kaj alies), plendleteroj post sufiĉe longa tempo havis sukceson: venis plibonigita programo, (Locoscript 2). Mi neniam akiris tiun programon, ĉar intertempe mi eksciis pri nederlandano, Roel Haveman, kiu mem sukcesis adapti la programon al Esperanto. ... mi pretas sendi ĝin al iu membro kontraŭ repago de kostoj, (disko kaj afranko). Mia versio estas por Azerty-klavaro, sed la disko havas ankaŭ adaptinstrukciojn.

Mi havas kelkajn demandojn pri la Amstrad 9512. Ĉu ĝi kapablas presi ŝ kaj Ŭ? Kian diskformaton ĝi uzas? Ĉu eblas ŝanĝi litertipojn?

Volonte la Redaktoro aperigus respondojn aŭ/kaj komentojn.

Enigma, ĉe la rando de inflacio.

Foje dum redaktado de proponita teksto, sed ankaŭ foje dum verkado de propra teksto, necesas doni apartan pripenson al elekto de la taŭga, (aŭ foje al la plej taŭga), esprimo por iu pripensata ideo.

Kvankam en nia lingvo plej ofte ni rajtas pensi, ke por iu vorto ekzistas nur unu signifo, kun ebleco de iom alia senco kiam la vorto estas uzata figurative, ja konataj estas aliaj kazoj.

Tiuj kazoj ŝuldiĝas, ŝajne, al frua epoko, tiu kiam la vortstoko de la lingvo estis ankoraŭ evoluanta kaj pligrandiĝanta. Tiam, se iu aŭtoro uzis vorton en iu nuanco, tiun nuancon kolektis kaj registris leksikologo, dum en alia lando, alia aŭtoro uzis la vorton sen tiu nuanco, kaj tiun duan signifon kolektis, aŭ la sama aŭ alia leksikologo.

Iom post iom, tiuj nuancaj diferencoj malgraviĝis, kaj la stato de unu difino ligita kun unu vorto estas plej parte atingita.

Sed tamen, kelkaj esceptaj kazoj ankoraŭ ekzistas, kazoj, tio estas, de unu signifo al E.-istoj en unu lingva regiono, kaj iom alia, kvankam certe ne mala, signifo al E.-istoj en alia lingva regiono, por la sama vorto aŭ por la sama radiko. Konataj ankaŭ estas kazoj de utiligo de konata, kvazaŭ ĉiutaga, vorto por ideoj kaj bazaj kaj rafinitaj.

Kazo por ilustriti tion estas la vortoj ligitaj kun la nombro cent. La kvazaŭ ĉiutaga vorto, procento, estas ĝenerale uzata por ĉiuj bezonoj, sed konsilindas pripensi uzadon de aliaj vortoj por kelkaj nuancoj de la baza ideo.

Plena Vortaro donas por 'procento' tri difinojn. El ili, la unuaj du estas ĝenerale alia ol du vortumoj por, efektive, la sama difino. 1e: profito produktata de monsumo pruntita aŭ ŝuldata; 2e: profito produktata de cent monunuoj dum unu jaro. Por la dua, uzekzemplo estas "la dividendo estas 5 procento."

Tria difino por 'procento' estas: valoro aŭ taksado difinita rilate al la nombro cent. Uzekzemplo el la plumo de Zamenhof estas: "en la vortaro oni povus ŝanĝi nur iajn 10 procentojn da vortoj" PV proponas, ke en tia kazo estus pli konsilinde uzi 'centonojn' ol "procentojn", kaj krome donas la ĝeneralan konsilon, ke por la tria senco en tuto ŝajne estas preferinde uzi 'elcento' aŭ 'pocento', kaj lasi al 'procento' senco nur financan.

Konkreta, faka kazo konscie trovi kaj uzi ĝuste la taŭgan vorton ja rilatas al inflacio. Estas konate, ke por mezuri inflacion oni elpensas teorion 'karbon' da konsumaĵoj por reprezenti la bezonojn de tipa familio dum tipa periodo, kaj al la sumo de la kostoj de tiuj bezonataĵoj atribuas ciferon de cent.

Oni tiam kreas serion de indeksciferoj, en kiu serio la unua cifero estas tiu cent.

Oni poste kontrolas ĉiumonate la kostojn de la samaj bezonataĵoj, rilatigas la sumon al la antaŭa sumo, kaj deklaras plialtiĝon per nova indekscifero en la serio.

Konkreta ekzemplo povus esti tio por Britio, en kiu lando oni komencigis novan serion per 100 en januaro, 1987, kaj trovis en januaro 1988, ke cifero de 103.3 estus nun la taŭga indekscifero. Oni do deklaris, ke en januaro, 1988, inflacio staris je 3.30 elcento, (kompare kun antaŭ unu jaro). En junio, 1988, la indekscifero estas 106.6 kiu donis ciferon de 4.61 elcento por inflacio dum la jaro ĝus finiĝinta. En julio, la indekscifero plialtiĝis al 106.7, dum inflacio plialtiĝis ĝis 4.81 elcento.

Jen la malfacilaĵo, do. La plialtiĝo de la indekscifero estis (106.7 - 106.6) egala al 0.1 indeksunuoj. Sed ĉu tiu neologismo estas la plej trafa?

En la angla lingvo, oni raportas, ke "the index rose by point one of a percent age point; inflation now stands at 4.81 per cent." Se ni interkonsentas, ke "elcento" estas taŭga esprimo por la angla "per cent", ĉu ni rajtas aserti, ke "indeksunuoj" estas taŭga por "one percent age point"?

Pli-malpli la sama malfacilaĵo konstatablas pri la prezindekso pri akcioj. En la Borso, oni raportas foje, ke "la indekso plialtiĝis per 20.7 unuoj, kaj staras nun je 1965.8 unuoj." (En la angla: "the S.E. Index rose by 20.7 and now stands at 1965.8 (points).")

Malofte en la Borso oni kalkulas la plialtiĝon dum la ĝus pasinta jaro, (kiel oni nepre faras pri la prezindekso pri konsumajtoj), sed ĝi ja okazas.

Kaj simile pri aliaj serioj de indeksciferoj.

Ĉu legantoj volas proponi pli trafajn neologismojn?

Lorens' Mi.

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakogrupo (IKEF)

Spezokonto - Bilanco - Financa raporto por 1988 (la sumoj estas en belgaj frankoj; inter krampoj la sumoj de la antaŭaj jaroj)

Kostoj	Spezokonto por la jaro 1988			Rimedi			
	(1987)	(1986)	(1987)		(1986)		
Gen. kostoj kaj deprezoj	728	(1 439)	(2 294)	Membrokotizoj	23 228	(15 662)	(16 989)
Kostoj de materialoj	-	-	(3 825)	Donacoj kaj krompagoj	7 589	(2 557)	(9 218)
Kostoj de Novaĵletero	16 642	(5 402)	(13 976)	Ricevita rentumo	-	-	323)
Kostoj de afranko k.s.	12 055	(8 712)	(6 555)	Gajno pro peradvendo			
Kostoj de informado k.s.	-	-	(830)	reklamaĵoj kaj kurtagoj	3 555	(2 970)	(7 874)
Veturkostoj estraranaj	13 894	-	(8 749)	Malgajno por la jaro	8 947	-	1 825)
Gajno por la jaro	-	(5 636)			43 319	(21 189)	(36 229)
	43 319	(21 189)	(36 229)				

Aktivo	Bilanco je 1988.12.31			Pasiivo			
	(1987)	(1986)	(1987)		(1986)		
Starigaj kostoj	-	-	(789)	Kotizoj antaŭpagitaj	8 691	(6 263)	(8 586)
Biblioteko, ekipaĵoj	1 422	(896)	(1 120)	Kapit. dumvivaj membroj	13 210	(13 815)	(14 189)
Poŝtĉekkonto belga	13 032	(20 297)	(28 751)	Subtena fondaĵo	504	(504)	(92)
Konto ĉe UEA	12 604	(9 703)	(367)	Kreditoroj diversaj	15 776	(1 419)	(441)
Konto ĉe FEL	2 321	(3 570)	-	Kapitalo			
Sparkonto ĉe FEL	13 210	-	-	13355	(7719)	(9544)	
Debitoroj diversaj	-	(890)	-	gajno -8947 (+5636)	(-1825)		
				nete	4408	(13355)	(7719)
					4 408	(13 355)	(7 719)
	42 589	(35 356)	(31 027)		42 589	(35 356)	(31 027)

Detaligo

Kapitalo pro dumvivaj membroj:

Mee, Voit.

Kreditoroj diversaj:

Braun: 2 513

Gilbert: 13 013

Instituto Dex: 250

Rimarkoj

La sparkonto ĉe FEL (Flandra Esperanto Ligo) egalvaloras al la kapitalo pro dumvivaj membroj.

Pro transiro al nova komputoro FEL ne sukcesis pretigi la jarfinan konteltiron. La menciita saldo estas tiu de la oktobra eltiro. Intertempe ne okazis gravaj transakcioj.

Komentario

La enkasigo de la kotizoj okazis pli bone ol dum la pasintaj jaroj; tamen restas valoraj membroj kaj kandidat-membroj kiuj ne kapablas pagi sian kotizon. Pro tio kontribuoj de "patronoj" al la subtena fondaĵo estus bonvenaj.

La pasinta jaro estis ege deficitita. Unua kaŭzo estas la preparo de Esperanto-traduko de la terminaro *Key words*; veturkostoj grandparte kaj afrankokostoj duone rilatas al tio. Dua kaŭzo estas la eldonkostoj de nia bulteno, kiuj estas tro altaj kompare al la enspezoj.

89.01.30 Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto

Admono akceptita.

Por rajti redakti, oni devas esti kompetenta!

Akademiano Bernard Golden

En LN 23 (oktobro, 1988, pĝ. 11) troviĝas artikolo el la plumo de Redaktoro Lorens' Mi kun la titolo, "Ĉu oni rajtas redakti ... ?" Tiu redaktoro, LM, abdicis modifi unu el la Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto antaŭ publikigo en LN, kaj poste li demandas: "Ĉu iu ajn Redaktoro havas la rajton kvazaŭ korekti ... la lingvo-uzadon de Akademiano ...". Surbaze de la atestaĵoj prezentotaj ĉi-sube, mi respondas la demandon de LM jene: Rajtas redakti nur persono, kiu estas kompetenta pri ĉiuj aspektoj de la lingvouzo.

LM konfesas, ke li estas pedanto pri kelkaj specialaĵoj de lingvouzo. Tiu karakterizo ne estas sufiĉe preciza; li estas ne nur pedanto sed ja obsedato! Nu, se lia propra lingvouzo estus perfekte laŭregula, li eble sukcesus konvinki aliajn pri sia rajto redakti ĉies verkojn. Bedaŭrinde, LM arogas al si balai antaŭ fremdaj pordoj, antaŭ ol lia propra domo estas tute pura.

Mia ĝustigo de ĉiuj lingvaj misaĵoj en la 12-paĝa numero 23 de LN estis peniga, temporaba tasko. Prezentado de ĉiuj detaloj tie ĉi nur tedus legantojn. Neniu vadas kun ĉuo tra tia lingva poluo. Pro tio mi pritraktos nur la specojn de eraroj, kiuj makulas la paĝojn -- tute ne "prestiĝajn" -- de la koncerna numero de LN. Mia celo estas reliefigi ekzemplojn de malbona lingvouzo, por ke ili ne plu aperu en LN.

Kio estas interpunkcio?

Sajnas, ke LM ne bone komprenas la signifon de la termino interpunkcio. Ĝi rilatas al la tipografiaj signoj uzataj por apartigi la frazojn aŭ la diversajn frazpartojn. En LN kaj en la propraj verkoj de LM troviĝas pekaj kontraŭ la reguloj de interpunkcio en Esperanto.

La sekvaj citaĵoj ilustras tion.

"Sed kion fari pri la I.O.-o kiu klare havas intereson por ĉiu faka organizaĵo en la Esperanto-Movado?" (pĝ. 11, kol. 1)

Komo estas bezonata inter "I.O.-o" kaj "kiu" por apartigi la relativan propozicion (*Plena Anal, Gramatiko, par. 9, 9*).

La dividstreko estas uzata en Esperanto por klarigi la konstruon de kunmet-

itaj vortoj, sed kiuspeca kunmetaĵo troviĝas en jena frazo?

"Post akiro de lerteco per aperigo de artikoloj en tiaj ne-tre-gravaj paĝoj, eble iam tiuj aŭtoroj donos al ni la altan plezuron ..." (pĝ. 4, kol. 2)

La tri vortoj en la sintagmo "ne tre gravaj" ne estas kunmetebaj en la bizara, tute ne utila kunmetaĵo "ne-tre-gravaj". Neniu regulo pri la uzo de la dividstreko permesas tion (PAG, par. 14, B).

Majuskligo kaj minuskligo

Tiu ĉi temo apartenas al la ortografio, ne la interpunkcio. PAG pritraktas la problemojn en la ĉapitro pri la substantivo en sekcioj pri propraj nomoj (PAG par. 39-40). La erudiciaj aŭtoroj de PAG klarigas, ke sur tiu ĉi tereno de la lingvouzo "regas ankoraŭ plena senordo", do ne havas sencin la granda bruo, kiun LM faras pri la skribmaniero de la nomoj de la monatoj en Esperanto. Anstataŭ piki kaj kritiki la Akademion de Esperanto pri bagatelaĵo, li dediĉu sin al profunda ekzameno de la demando pri majuskligo kaj formulu koheran teorion, kiun oni povas praktike apliki. Li ne forgesu, ke en la parola lingvo ne estas eble prononci majusklojn kaj minusklojn. Cetere, ekzistas bone funkcia alfabetoj en la mondo, kiuj ne diferencigas majusklojn disde minuskloj. Tiuj faktoj indikas, ke ni havas aferon tie ĉi kun nura konvencio.

En LN aperas pluraj ekzemploj de ne-konsekvenca uzado de majuskloj. Ne estas komprenebla, kial la sekvaj vortoj komenciĝas per majusklo: Membro, Redakcio, Stelo (sed "pundo"!); Jen kuriozaĵo; la sama persono estas "membro" kaj "Membro".

"De nia membro en Kimrujo, Britio, S-ro John Dickinson, ni ricevis longan priskribon ..." "La kunvenejo estas mem tre vizitinda, skribas nia Membro." (pĝ. 4, kol. 2)

Kaj kiuspeca fuŝa frazkonstruo estas la sekva, en kiu du vortoj kun majuskloj troviĝas ene de la frazo?

"Por ĉiuj viaj subtenoj en tio, Anticipan Dankon!" (pĝ. 4, kol. 1)

Por rajti redakti, oni devas esti kompetenta! - daŭrigo -

Mallongigoj kaj sigloj

Alia aspekto de la lingvouzo, apartenanta al la ortografio, estas la formo de mallongigoj kaj sigloj. En LN ili estas uzataj en narstarige kaosa maniero laŭ la kaprica bontrovo de aŭtoroj kaj la redaktoro. La normlingva mallongigo de "sinjorino" estas "s-ino", sed en LN troviĝas jena anomalia formo.

"S-rino Szabó-Felső" (pĝ. 3)

Kio estas "I.O."? Tiuj du inicialoj estas uzataj plurfoje sur pĝ. 11. Laŭ la kunteksto, temas pri "Oficiala Informo" de la Akademio de Esperanto, do la mallongigo devas esti "O.I." Jen dua enigmo: se "I.O." signifas "Informilo Oficiala", kial ĝi ricevas substantivan finaĵon: "I.O.-o(j)(n)? Io ne estas en ordo malantaŭ la verda pordo!

Manko de konsekvenco trafas ankaŭ la siglon de *Laŭokaza Novaĵletero*.

- a. "la LN-o" (pĝ. 11, kol. 1);
- b. "LN-n 21" (pĝ. 8, kol. 1)

En (a) estas uzata la difina artikolo kaj la substantiva finaĵo, dum en (b) mankas la difina artikolo kaj la "o" antaŭ la akuzativa finaĵo. Kial ne estas unuforma maniero skribi tiun siglon?

Gramatikaj malĝustaĵoj

La plej cerbskuaj ekzemploj de lingvouzo en LN 23, estas tiuj, kiuj ne obeas gramatikajn regulojn. Dum unu jarcento esperantistoj pene provis lerni la uzon de la akuzativa kazo en Esperanto. Kelkaj citaĵoj el la koncerna numero de LN atestas, ke tutcerte ankoraŭ unu jarcento estas bezonata. En la unuaj du ekzemploj, la akuzativo mankas.

- a. "Reklamanonco de entrepreno en la paĝoj de FOKUSO kostas ducent kvindek usonaj dolaroj." (pĝ. 6, kol. 2)
- b. "La finrezulto oni tradukos en, unuakaze, la anglan ..." (pĝ. 7, kol. 1)

En (a) devas sekvi post la verbo "kostas" la vortoj "usonajn dolarojn", ĉar temas pri mezurindika adjekto (PAG par. 207). En (b) la rekta objekto de la verbo "tradukas" estas "finrezulton". Same ofta eraro estas la superflua uzo de la akuzativa kazo.

- c. "Oni diras, ke en ĝi restas ankoraŭ

difektetojn." (pĝ. 9, kol.1)
ĉ. "unu-foja pago egala al 20-oble tiele/ bazan kotizon" (pĝ. 2)

En (c) "difektetoj" estas la subjekto, do ĝi devas esti en la nominativa kazo. En (ĉ) post la prepozicio "al" devas sekvi "20-obla baza kotizo".

Preskaŭ nelernebla gramatikaĵo estas la uzo de adverba participo.

- d. "Por aliaj taskoj, utiligante komputorojn, jam estas proponataj simila memordiskoj ..." (pĝ. 9, kol. 1)
- e. "... enmeto de frazo pri abundeco de materialo neklarigita sed evidente ne havante ian rilaton kun la Oficiala Decido mem." (pĝ. 11, kol. 1)

En (d) ne estas uzebla adverba participo rilatanta al "taskoj", ĉar tiu ĉi vorto ne estas la subjekto de la frazo. Oni devas skribi "utiligantaj". Same en (e) "frazo" ne estas fraz-subjekto, do al ĝi povas rilati nur adjektiva participo: "havanta" (PAG, par. 183).

Ankaŭ la transitiveco de verboj estas grava stumbligilo.

- f. "... favoraj prezoj aplikas nur se oni restas tute ene en la reto ..." (pĝ. 9, kol. 2)

"Apliki" estas transitiva verbo, sed en tiu ĉi frazo ne okazas paso de ago de subjekto al objekto. Sekve, la verbo devas esti netrinitivigita: "aplikiĝas".

Estas eble daŭrigi tiun ĉi pritrakton de lingvaj fuŝaĵoj en LN 23, sed mi opinias, ke mi sufiĉe efike marteladis la punkton, ke neniu rajtas redakti verkojn de aliaj aŭtoroj, se li ne kapablas sen-erariĝi siajn proprajn tekstojn.

La redaktoro de LN, atakante la enhavon de unu el la Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, surpaperigis la sekvajn vortojn, kiuj estas gravedaj je signifo.

"... se iu tia leganto estus motivigita kutimiĝi al malbona aŭ eĉ erara lingvo-uzado, sekve de legado de Oficiala Informo de la Akademio de Esperanto, mi tion tre bedaŭrus."

Per mia analizo de la lingvouzo en LN, mi montris sen ombro da dubo, ke la opinio de LM bumerange revenis por trafi la periodaĵon de IKEF. Ni ĉiuj bedaŭru tion.

LA OFICEJO : pasiva kosto aŭ aktiva investaĵo ?

Ken Davies

Cu vi pretas eluzi mil kilogramojn da ŝtalo pro produkto, kies fina pezo estas nur sescent kilogramojn? Aĉ preni kvin metrojn da ŝtofo por vestaĵkompleto, kiam bezoniĝas nur tri metrojn? Kompreneble, la respondo estas ne. Tamen: malmultaj direktistoj rimarkas, ke ili malŝparas parton de sia plej grava havaĵo, tio estas, la sumo de laborfortoj, je simila proporcio. Laŭ raportoj de londona profesia grupo de konsultistoj pri direktadaj metodoj, (la entrepreno W.D. Scott, de kiu la aŭtoro estas mem alranĝa direktisto), la tipa oficejo redonas al la entrepreno nur ĝis 61 elcento de la kosto, sekve de tiu ofte renkontita pensmaniero, ke 'la oficejo' estas jam deskribita en tuto, kiel ne-profitdona sed tamen nemalhavebla aldono al la pasivaj kostoj de la entrepreno.

Cu vi ne pretas tion kredi? Nu, kontrolu mem vian propran oficejon, kaj faru kelkajn demandojn. Jen ekzemploj de la demandoj.

Kiom da laboro ekzistas por 'la oficejo'?

Se vi ne povas uzi unu el la haveblaj formalaj sistemoj por mezuri la laborbezonojn en oficejoj, almenaŭ kontrolu kiom da laboro estas efektive elspezita valore. Kutime, konsterniga proporcio estas malŝparata pro interrompoj en la laboro; periodoj kun ne-sufiĉe da laboro por la haveblaj laborfortoj; ĝustigo de eraroj, kaj atendado por aliaj personoj.

Memoru -- ne-sufiĉe da laboro estas demoraliza forto: homoj preferas esti okupataj. Se komizoj estas ne-sufiĉe okupataj, ili ofte trovas metodojn plenumi la horojn per elpensitaj bezonoj por kromaj listigoj, raportoj, korespondado, aŭ per kontroloj por kiuj, tamen, neniu efektiva bezono ekzistas. La rezulto estas malŝparo, kaj de la papero mem kaj de la laboroj de aliaj personoj, kiuj devas la listigojn aŭ raportojn legi, arkivigi kaj tiel plu.

Do, logike al la posta demando:

Kiom da la rezultoj estas bezonataj?

Kontrolu ĉiujn regule faratajn listigojn kaj raportojn, precipe de la vidpunkto de la agoj stimilitaj per tiuj raportoj. (En iu oficejo, la ĉefa komizo estis okupita duontempe nur en kompilado de detala raportoj pri la sumo de la produktado mem kaj ties kostoj detalaj. Post trafikaj demandoj oni sciigis, ke la kvar ricevantoj de la raportoj fanatike arkivigadis ĝin - "pro ebla bezono estonta."

Montriĝis, tamen, ke la direktanto, kiu la raporton iniciatis, iris for al alia posteno antaŭ tri jaroj.)

Zorge kontrolu la enhavon de la elkorbo de la tajpistinoj. Cu pravas, ke ĉiu tajpskribita raporto devas esti tiele farita, aŭ ĉu manskribado ne, foje, suficius? Cu tiuj interfakaj memorandoj estas vere necesaj? Cu raportoj estas regule mimeografataj nenecese? (Ĉiun tagon, en iu uzino, la provizejkomizo eldonis al 24 fakestroj kopion de listo de enirintaj varoj por la koncerna tago; la tute samaj informoj aperadis en elpresaĵoj de komputoraj traktaĵoj.)

Kritike kontrolu kaj la utilon de datordigitaj registroj kaj la uzadon de datstampiloj. Oni ofte trovas, ke ili estas nur mekanismoj de sinprotekto, celataj al venko dum interfakaj disputoj. ("Sed ni ne ĝin ricevis ĝis la 20a ...") Kontroladsistemoj ofte troviĝas en la sama kategorio.

Tiam: Cu ilia laboro iras laŭ entabvidebla plano?

Neniu dubas pri la neceso detale plani la etapojn de uzinaj metodoj. Cu estas juste, ke la oficejo devas fronti periodojn da furioza laboro, (kiam eraroj konstatiĝas), sed ankaŭ frustraciajn periodojn de senlaboreco?

Cu ni uzas la plej taŭgajn aparatarojn?

Multe da tempo povas esti malŝparita - aŭ pli efike uzata -- per la uzo de maŝinoj por oficejaj taskoj. Komencu per listigo de la veraj taskoj al kiuj la maŝino(j) estos dediĉita(j). Tiam petu tian senkoston konsiladon haveblan de la agente de la fabrikistoj. Elektu maŝinon taŭgan por plenumi viajn plej oftajn traktaĵojn plej efike, konsiderante: fidelan plenumadon, daŭrajn kostojn, konservad- kaj riparad-bezonojn, kaj aĉetprezon. Kuntrenu la stabanaron en la diskuton. Plej eble ili rekonos la malavantajojn kaj apartajn trajtojn.

Cu ni malŝparas paperon?

Kontrolu la enhavon de la rubaĵkorbetoj oficejaj. Cu oni faras malnetajn notojn sur multekostaleterfolioj aŭ formularoj? Cu la korbeto de la tajpistinoj enhavas ne-finitajn leterojn elprenitajn el la maŝino post nur unu eraro? (Se jes, ne kulpigu ilin: trejnu ilin!)

Ne akceptu la unuan takson, sen plua esploro, kiam vi aĉetas komercajn bezonaĵojn. Bonkvalita papero havas prestiĝan aspekton, konstateble, sed io malpli

La oficejo: ... daŭrigo

multekosta eble kontentigas vian bezonon, foje. Ĉiu desegnadoficejo kutimis elspez: jare kvarcent pundojn por multekosta grafikaĵpapero, ĝis la tago en kiu ĉu eltrovis taŭgan alternativon kies kosto estas nur cent pundoj jare.) Vi eble trovos, ke taksoj por presado varias en simila proporcio.

Cu nia arkivsistemo estas efika?

Nebezonataj arkivaĵoj kaj prenas multelostan spacon kaj sorbas multekostan hejtadon. Samtempe, ili plenumas la haveblan spacon kaj malplifaciligas serĉadon por bezonataj informoj, kaj la sekvo de tio estas demoraliza kaj ankaŭ malŝparas tempon.

Nu! ne estu sciuriulo.

Aranĝu forĵetsezonojn almenaŭ unufojon jare, kaj atentu pri tiu plej ofte renkontita plenumilo de arkivo, la trakopio. (Provu sistemon de cirkuladaĵ dosierujoj, anstataŭbe.)

Se vi vere devas konservi dokumenton por estonta kontrolo, certigu, ke oni ĝin facile re-trovos. Strebu antaŭvidi la cirkonstancojn, en kiuj la bezono ĝin re-vidi eble kongruas. Se la okazo estos respondi al demando de kliento, tiam ordigu la dokumenton arkive laŭ la nomo de la kliento, (plej eble li ne citos tiun mendo-numeron iaŝance); se la okazo certe venos je la sama dato de la proksima monato, tiam ordigu la dokumenton arkive kronologie.

Cu ni ĉasadas la taŭgajn celojn?

Eldona entrepreno troviĝis kun stabo de dek komizoj, por kiuj la komuna tasko estis sekvi kaj esplori la plendojn de klientoj, plendoj ĉefe de abonintoj de periodaĵoj kaj pri ne-alveno de apartaj kajeroj. Poste, anstataŭ tiuj longdaŭraj enketoj kun ne-evitebla korespondado, oni instalas sistemon de ekspedo de la koncerna kajero tuj post ricevo de plendo. La rezulto: ok malpli da malfeliĉaj komizoj, samtempe kun granda nombro pli da kontentaĵ klientoj.

Finofare: Cu 'la oficejo' vere estas nenio alia ol pasiva kosto?

Cu la vero ne estas, ke la oficejo signife influas viajn profitojn je multaj aliaj manieroj? Ekzemple:

- efika traktado de mendoj kondukas al pli rapida ekspedo, al pli ofta var-cirkulado;
- ĝustatempa ricevado de la pagoj dependas je efika fakturado, kaj povas esti signifa sumo je via neta profito;

- ĝustatempa mendado de materialoj por viaj propraj procedoj evitas mankojn kaj pro tio la multekostajn ĉes- kaj rekomenc-ojn de produktlaboro, (taksita kiel kaŝita malŝparo de laborokostoj ĝis la nivelo de kvin procento de la tuto);

kaj tiel plu. Kun taŭga direktado, la oficejo estas grava profitdona servocentro. Krome, ĝi estas pli agrabla loko en kiu labori.

glosaro:
frustracio - stato de individuo, kies fundamenta tendenco aŭ bezono ne povas kontentiĝi.
PIV

Tradukita de Lorens' Mi el:
Management Review and Digest, London, 1976.

Noto de la Redaktoro.

Konsiderante la grandajn evolupaĵojn rekonatajn en la kampo de oficejaj sistemoj kaj ekipaĵoj en la lastaj dek du jaroj, multo el tiu artikolo ŝajne estas ankoraŭ aktuala. Plaĉus al ni aperigi artikolojn pliampleksigajn pri tiu temo de oficejaj sistemoj.

----- o0o -----

A n o n c e t o

La Stelo.
La valida kurzo en Britio por la Stelo estas:
1.00 pundo egalas al 3.325 Steloj. Respondecas pri ĝi S-ro Lorens' Mi,
19 Cranbury Road,
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,
Britio. Petu detalojn, aldonante irpk-on.

(La Biblioteko de IKEF - daŭrigo de paĝo 3)

- Albanio, (priskribo de la lando el komerca vidpunkto);
Hj. Unger; eldonita de Internacia Komercio, Köln, 1923; 16 paĝoj.
- La Hungara Kooperativa Movado;
Józsel Pál; Budapeŝt, 1982; 14 paĝoj.
- Dilemoj de la nuntempo - vide el Hungario, (ses eseoj sub redaktado
de Sándor Révész; Budapeŝt, 1984; 102 paĝoj.
- Komputada Baza Terminaro;
Kalckhoff kaj Pick; Hamburg, 1985; 52 paĝoj.
- Esperanto en la Viena Radio;
Karl Beckmann; Wien, 1985; 25 paĝoj.
- Kolekto da spritaĵoj, kolektita de Radio Vieno;
(Redaktita de) Karl Beckmann; Wien, 1988; 25 paĝoj.

Principe, tiu Biblioteko estas disponebla sekve de peto al iu membro de la Fakgrupo. Necesas promesi re-sendu la verkon post studado, kaj ankaŭ re-pagi al la fakgrupa kaso iujn elspezojn pro afranko, ktp.

La kolekto troviĝas nun je la adreso de la Redaktoro. Sinpropono de iu Membro preta transpreni la ŝarĝon estus bonvenigita de la Estraro.

Teknike pri la Laŭokaza Novaĵletero.

Respondeca redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee, ĉe la Redakcia adreso:
19 Cranbury Road,
Eastleigh, Hants.,
SO5 5HB, Britio.

Eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas Internacia Komercio kaj Ekonomia Fakgrupo, ĉe la provizora ĉefsidejo:
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16,
Okc. Germanio.

La Redaktoro kaj Eldonanto aperigas suskribitajn artikolojn sen aŭtomata akcepto de respondeco por opinioj tie esprimitaj.

La rajto de represado estas malferma al ĉiu ajn persono aŭ instanco, kiu tiun rajton volas preni, kondiĉe nur, ke la fonto estu klare indikita.

La limdato por ricevo de materialo por la proksima kajero estas mardo, la 11a de aprilo, 1989, en Eastleigh, Britio.

La Laŭokaza Novaĵletero akceptas mendojn por anoncoj kaj anoncetoj, de membroj aŭ instancoj.

Membroj de IKEF havas la rajton peti aperigon de anonceto sen ia devo pagi ia koston. Ne-Membroj de IKEF rajtas peti aperigon de anonceto kontraŭ tre modesta tarifo. Petu detalojn de la Financa Konsilanto en Belgio.

Reklamtarifo

por pli ampleksaj anoncoj:

plena paĝo 1 800 b.fr.;
duona paĝo 900 b.fr.;
kvarona paĝo 500 b.fr.,
(respektive 100, 50 kaj 30 nederlandaj guldenoj), kun ĉiam validaj rabatoj de 25 elcento por membroj de IKEF, kaj ĉiam tri aperoj de la sama anonco en sinsekvaj kajeroj por la prezo de du tiaj aperoj.

Varbi reklamanoncojn por nia organo estas tre trafa metodo subteni vian organizaĵon!